


pola esperantisto

socikultura revuo de
polaj esperantistoj

Jaro 97 • N-ro 4/2003 • ISSN 0032-2431



*Artafiŝo de ĵus okazanta 13a Festivalo de Juda Kulturo en
Krakovo. Ĉu esperantistoj utiligos la eblecon propagandi tie?*

4
2003

Enhavtabelo:

HISTORIE

- 99 *Denove malfavora periodo por la Lingvo Internacia.*
104 *Forpasis Antoni Golonka.*
-

LINGVA ANGULETO

- 106 *Praktika uzado de la „diabla vorto” PO.*
-

INSTRUADO

- 110 *Mia (kaj onia) Esperanto-kurso. Kion ĝi enhavu?*
112 *Vizito de portugala instruistoj en Koszalin.*
114 *Internaciaj ekzamenoj (UEA-ILEI).*
115 *Biografieto de Andreo Cseh. Internacia Esperanto-Instituto.*
117 *Kio estas Cseh-metodo?*
-

- 118 *LETEROJ, POLEMIKOJ, EVENTOJ...*

Redaktoraĵo

Nekutime en tiu ĉi loko, kaj do mallonge: pro komenciĝintaj somerferioj, la nuna numero de la revuo iom malpli „peza”! Dank’ al niaj legantoj multiĝas reagoj, venas leteroj, nur menditaj kontribuoj venas ne tro... ĝustatempe.

Certe vi trovos la numeron interesa, kvankam iom alia, ol la antaŭaj. Atendu jam la 5an, kiu alportos i.a. ege interesan intervjuon, aron da bonaj novaĵoj, iom da poezio kaj (espreble) raportojn de UK-partoprenantoj.

Por ĉiuj, kiuj povas ripozi dum la somerperiodo en esperantista etoso, mi deziras fruktodonan tempon kaj agrablajn sonĝojn pri venko de Esperanto.

via redaktoro

pola esperantisto

socikultura revuo de polaj esperantistoj, aperas 6 fojojn jare
eldonas: Eldonejo HEJME, <http://www.hejme.e-tools.pl>
Redakcia stabo: Zofia BANET-FORNALOWA, Czesław BARANOWSKI,
Zbigniew GALOR, Andrzej KOŁPANOWICZ, Ilona KOUTNY, Kazimierz
LEJA (ĉefredaktoro), Lidia LIGĘZA, Stanisław MANDRAK, Danuta
ŻELIŃSKA kaj multaj kunlaborantoj.

Ĉiujn korespondadojn kaj materialojn sendu al la adreso de la
eldonejo (tamen preferu retpoŝte: esperanto@hejme.e-tools.pl).

Jarabono pola: 30,00 PLZ pagenda al:

Wydawnictwo HEJME, 41-250 Czeladź, ul. Wąska 21
BRE Bank SA-mBank • 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644

jarabono eksterlanda: 12,00 EUR pagenda al:

UEA-konto: <kazl-s> • FEL-konto: <leja-t>

Jaro 97 • N-ro 4 / 2003 • ISSN 0032-2431

aktuala eldonkvanto: 220 ekz.

la rubrikon gvidas Zofia BANET-FORNALOWA

Denove malfavora periodo por la Lingvo Internacia

„*La Movado tamen daŭris*”.

En antaŭa numero de PE estis skize prezentita renaskiĝo de Esperanto-movado en Pollando kaj kiel grava en ĉi-pozitiva procezo estis relanĉo de „Pola Esperantisto” en majo 1946.

Bedaŭrinde, post unua kapto de spiro, danke al idealisma, sindona laboro fare de grupo de Esperanta aktivularo, amasiĝis denove nigraj nuboj en t.n. socialismaj landoj. Tiun ĉi malfavoran, bremsantan demokratian evoluon de l’vivo en landoj de orienta kaj meza Eŭropo, kiuj antaŭnelonge liberiĝis de nazi-germana neimageble kruela regado, oni nomas eŭfemismo-periodo de persona kulto; alie ekrego de stalinismo.

En ĉi tiu periodo ĉiuj demokratiaj organizoj kaj movadoj estis konsiderataj kiel kosmopolitaj, do... danĝeraj por socialismo.

Postmilite okazis 3 sinsekvaj tut-polaj Esperanto-kongresoj, en 1946, 1947 kaj 1948. Tamen, pro ekestinta malfavora prttaktike situacio la

anoncita por 1949 la 4a kongreso, kiu devis okazi kiel du antaŭaj en Varsovio, ne povis efektiviĝi, kaj la jam kompostita prespreta „Pola Esperantisto” ankaŭ ne povis aperi.

La ŝtataj kaj administraj instancoj leĝe malpermesis Esperantan agadon, sed per reprezalioj (cenzurado de la revuo kaj de aliaj skribaĵoj), „konsilioj” al apartaj aktivuloj, ke pli bone ĉesi... ekestis malfavora etoso ĉirkaŭ la Movado. Rezulte, el 30 filioj de AEP komence de la jaro 1950 efektive funkciis en la 50aj kaj komence de la 60aj jaroj nur 2: en Varsovio, danke al persisto, saĝo kaj „obstineco” de grupo de antaŭmilitaj aktivuloj: Bugajski, Jaraczewski, Pleskaczyński, Roman, Zawada, sub gvido de ĝenerala sekretario Isaj Dratwer, kaj en Vroclavo, danke al sperto kaj kuraĝo de malnova esperantisto Jakub Garbar.

Por ne perdi kontakton kun la membroj de la Asocio kaj por doni al ili Esperanto-legaĵon, ankaŭ por ke ne estu ĉesigita kontakto kun eksterlanda Esperanto-movado estis lanĉita multobligata skribaĵo,

je rajto de manuskripto, s.t.: „Tra la Mondo kaj LLiteraturo” (1950–1952), kaj poste (1953–1956): „Bulteno de Asocio de Esperantistoj en Pollando”. Eldonis ĝin Redakta Komitato de AEP, kaj kiel ĝia administranto funkciis tiama teknika sekretario de la Ĉefa Estraro, Stanisław Roman — esperantisto ekde la fino de 20aj jaroj de la intermilita periodo. Nomojn de la redaktoj oni preferis ne publikigi.

En subtitolo estis oficiale skribite, ke la bulteno enhavas krestomation de literaturo por korespondaj Esperanto–kursoj. Tamen efektive la revuo plenumis multe pli vastan rolon. Temis pri subteno, stimulado kaj klerigado de la Movado. Entute tio gravis por ĝia daŭrigo, malgraŭ ĉiuj obstakloj,

Nekredeble, sed kaj la unua bulteno kaj la dua aperis sufiĉe regule kiel monataĵo. Pretigita sur tre mizera papero, rekompencis la legantojn per varia kaj signifa enhavo.

Valoras kun tiuj bultenoj konatiĝi ĝuste pro ilia enhavo, sed ankaŭ por omaĝi al tiuj sindonaj kuraĝuloj de Redakta Komitato, ĉar iliaj meritoj por la Movado estas sendubaj.

Karakterize, ke la korespondantoj en sia grandparto evitis ankaŭ subskribadi siajn kontribuojn per plena nomo, signante ilin per nominaloj. Pri adresoj oni menciis kutime nur urbojn. S–ano Zdzisław Glajcar apartenis al nepluraj, kiu kiel peranto de „Slovaka Espe-

rantisto” senkaŝe sciigis pri sia nomo kaj adreso...

„Tra la Mondo kaj Literaturo” startis en marto 1950, sed por ke la legantoj ricevu plenaryan kolekton la Redakta Komitato de marto ĝis majo eldonis 5 numerojn. Admirinda fortostreĉo!

En la 1a numero la redakcio instigis, por ke la legantoj pagu jaraĵon por „Pola Esperantisto” informante pri ĝia konto. Videble oni kredis ankoraŭ tiutempe, ke ĉi tiu revuo povos aperadi. Pro decidaj malhelpoj tiu espero tamen ne realiĝis... Restis do nur la novlanĉita, primitiva teknike, sed valora enhavo bulteno.

De la enkonduka redakcia artikolo la legantoj ekscias, ke celo de nova revuo estas prezenti Esperantan kulturon, malgraŭ esencaj malfacilaĵoj, ĉar kun aliaj valorajoj de pola kulturo perdiĝis preskaŭ ĉio Esperanta. Bonŝance de tempo al tempo venas al la Asocio iuj savitaj en keloj, kiel estis notite, esperantaĵoj, kaj tion, kion AEP havas „ni publikigos”...

La redakcio komencas de „Sinjoro Tadeo”; ĝi estas po parte publikigata en ĉiu n–ro. Tiamaniere post kelka tempo la legantoj povas kolekti la tutan epopeon.

Rilate literaturon oni dekomence ne limiĝis al „Sinjoro Tadeo” — ŝatata klasikaĵo en superba traduko de Antoni Grabowski. Estis publikigitaj ankaŭ fragmentoj de „Quo Va-

dis” de Henryk Sienkiewicz, „Patro” de Antoni Ĉehov, poemoj de L. L. Zamenhof, Leo Belmont, Aleksander Neuman. Aperadis provoj de novaj tradukoj de poemoj kaj prozo i.a. de Słowacki „La patro de pestuloj” fare de Stanisław Roman, kiu plenediĉe laboris por ke la revuo entute povu aperadi.

N-ro 7-8 (julio-aŭgusto 1950) kun escepta rozkolora kovrilo, estas dediĉita al pola poezio de antaŭmilitaj esperantistaj poetoj tradukita Esperanten, kiuj dum nazia periodo plejparte pereis. La redakcio petis tiuokaze, ke la esperantistoj traduku Esperanten polan postmilitan literaturon.

Kun kontento la redakcio akceptadis „unuajn provojn” ĉirilatajn. En la lasta en 1950 jaro, 12a n-ro oni informas i.a., ke venis tiaj. Sian originalan poemon prezentis Remigiusz Kossakowski el Sochaczów; sciante pri liaj postaj grandaj meritoj por pola literaturo, kaj Jadwiga Rydygier, kiu sendis poemon kaj prozan tradukon. Ankaŭ ŝi evidentigis poste valoran poresperantan aktivadon.

Kiel dirite „Sinjoro Tadeo” aperadis po parte en sinsekvaj n-roj, sed krome de tempo al tempo preskaŭ en tuteco la literatura parto de la revuo estis dediĉita al literaturo de apartaj popoloj. En n-ro 4/1950 estis prezentita la bulgara, en la 5a — hungara, en la 6a estas publikigitaj eroj el literaturo portugala, provan-

ca, rumana, rusa, serbo-kroata, slovaka, sveda, ukraina.

Literaturo estis prezentita Esperante kaj gravaj informoj parte pole. Abunda estis ankaŭ la distra parto kun eldiroj de filozofoj. Aperadis anoncoj pri korespondado kaj interesaĵoj pri Esperanto-aktivado en diversaj landoj. Ankaŭ raportoj el Universalaj Kongresoj. Ĉi-rilataj informoj estis en sia grandparto represitaj el „Heroldo de Esperanto” kaj estis kun granda intereso legataj de abonantoj; ja tiutempe pollandaj esperantistoj samkiel el aliaj landoj de socialista bloko, ne havis eblecon partopreni kongresojn, nek entute libere vojaĝi eksterlanden.

En ĉiu n-ro la redakcio substrekas, ke „Tra la Mondo kaj Literaturo” estas eldonata por gelernantoj de Esperanto, kaj verŝajne tia oficiala „etiketo” donis ŝancon entute eldonadi la revuon... En realo ĝi tamen servis kiel organizanto-ligilo de pollandaj esperantistoj.

Sidejoj de ambaŭ, konstante funkciantaj filioj, tiu en Varsovio ĉe strato Marszałkowska 81 loĝ. 32, kaj ekde 1955 jaro (n-ro 8/9 de „Bulteno de Asocio de Esperantistoj en Pollando) ĉe strato Kozia 3 loĝ. 31, kie post sia profesia laboro de bakteriologo, ĉiutage persiste kaj plej sindone deĵoris la Ĝenerala Sekretario de la asocio Isaj Dratwer, kaj same la vrocłava ĉe strato Łowiecka 25 (en Kulturdomo de „Energetyk”), gvidata samdediĉe de Jakub

Garbar. Ambaŭ estis apogataj de areto de fervoraj kaj plenaj de iniciatemo idealistoj ĉiam pulsas per vivo. Tie naskiĝadis diversaj projektoj ŝajne ne realigeblaj en estantaj kondiĉoj, kiuj tamen almenaŭ parte realiĝadis.

Ĉefe gravis la realigo de celoj klerigaj por evoluigi la Movadon por akiri novajn adeptojn. Al tiu celo servis ekzemple ideo eldoni po parte en ĉiu n-ro de la revuo pol-esperantan vortaron. Ĝi estis anoncita en la 5a n-ro (1950) de la revuo. Oni esperas, ke la abonantoj kolektonte la publikigitajn partojn de la vortaro ilin mem bindos kaj tiamaniere fariĝos posedantoj de, ne malhavebla por ĉiu esperantisto, vortaro. Laŭplane la vortaro estos ampleksa. Bedaŭrinde, malmultaj legantoj pretis krompagi por aldonaj vortaraj folioj, tial nur en la 7-9 n-ro (julio-septembro 1951) troviĝas la informo, ke oni komencas presi en la revuo pol-esperantan vortaron.

Por subteni la Movadon kaj iel klerige doti ĝin, la redakcio lanĉis aliajn ideojn. Temas pri la „Migranta Libro-Legejo”. Sciate, ke preskaŭ neniu individua esperantisto, kaj aparte la novaj, kiuj nenion konservis el antaŭmilita tempo kaj ankoraŭ ne havis korespondajn kontaktojn, havis eblecojn akiri librojn kaj revuojn. Tiuj migrantaj, do pruntedonaj, bibliotekoj povis almenaŭ parte helpi en edukado.

En 1951 estis daŭrigata prezento de apartaj literaturaj (kaj pli vaste: kulturaj) eroj en Esperanto. La n-ro 6 (junio 1951) estas grandparte dediĉita al ĉinaj temoj: arto-teatro-filmo-klerigado-proverboj, krome troviĝas tie du poemoj.

Samnumere troviĝas ĝojiga informo pri la ebleco aboni „Malgrandan Revuon”. Ĝi estis elstara literatur-karakterata revuo eldonata en Skandinavio.

Same stimula informo, ke komence de la jaro 1951 la vroclava aktivularo eldonos dumonataĵon „Vroclavano”, enhave valoran. Krome estis publikigitaj adresoj por korespondado.

Inter kelkaj aliaj valoraj iniciatoj indas nepre mencii pri tiu publikigita en la 3a, marta n-ro de 1951 jaro. Temas pri pollingva „Alvoko al la Gepatroj”. Oni petas en ĝi, ke ĉiuj kiuj deziras, ke iliaj infanoj lernu Esperanton jam de la 3a vivjaro, estas petataj sendi sian adreson kaj ili ricevos ĉi-rilatan instrukcion. Oni petas mencii la aĝon de la infano. Vere pripensinda, ankaŭ por nuntempo, ideo.

Sekvas la informo: ni daŭre gvidas la korespondan kurson. Funkcias Gazet-legejo. Oni planas ekfunkciigi Libro-legejon. Komence de la numero troviĝas ankaŭ la informo pri prelegvojaĝo de prof. Ivo Lapenna.

Pro tio, ke ne ekzistis strokta malpermeso por Esperanta agado,

la aktivularo provis daŭrigi organizan laboron. Bedaŭrinde, informoj publikigitaj en la revuo ne estis ĉirilate esperigaj.

Estis jam dirite, ke oni ne eblis daŭrigi publikigadon de la asocia organo „Pola Esperantisto”. Same fiaskis kelkfoje ideoj alvoki tutpolarajn Esperanto-aranĝojn.

En maja numero (5/1950) la redakcio respondas demandojn de legantoj, ke oni ne antaŭvidas ĉi-jare Esperanto-kongreson en Pollando. „Dum la kuranta jaro ne estas decidite pri tia aranĝo”. Estas sciante, ke ne oni eblis pro politikaj kaŭzoj.

En la dua, februara numero de 1951 troviĝas jena komuniko de la Ĉefa Estraro de AEP: „Laŭ rezolucio de Ĉefa Estraro de la 15a de februaro 1951 oni alvokas je la 15a de aprilo la Kunvenon de la Delegitoj el la Filioj kaj Aktivaron kun jena tagordo: (1) Raporto. (2) Elekto de nova Ĉefa Estraro de la Asocio. (3) Plano de agado. (4) Liberaj proponoj. Ĉiuj membroj de la Asocio rajtas partopreni kunvenon”.

Oni krome atentigas, ke ĉar la kunveno okazos en la tago de mortodatreveno de l' kreinto de Esperanto ĉiuj kunvenintoj metos florkronon sur lian tombon. Oni petas veni amase! Sed jam en la 4a, aprila n-ro, aperas komuniko, ke pro „kialoj teknikaj la kunveno ne okazos la 15an de aprilo. Pri la nova dato oni informos”. Oni petas tamen la esperantistojn alveni al la solenaĵo kiu

okazos ĉe la tombo de D-ro Zamenhof la 15an de aprilo, okaze de la 34 datreveno de Lia forpaso.

En la sekva numero de la revuo (5/1951) estis priskribita digna trapaso de ĉi tiu solenaĵo. Okazan paroladon faris prezidanto de AEP Edward Bugajski. En ĝi li mencias pri funkciado de UEA, SAT. Li substrekas ĝeneralan progreson de Esperanto en la mondo. Por la fino li asertis, ke malgraŭ malfacilaĵoj kaj inerteco, kiun renkontas ankoraŭ nie Movado, „...ni laboru senĉese, ni iru la vojon celitan, ĉar la estonteco apartenas al ni”.

Sekvas la skizo pri personeco de D-ro Zamenhof fare de Jan Zawada. Kiel lasta parolis Antoni Czubyński rememorigante, ke ĉiuj lokoj ligitaj kun vivo de D-ro Zamenhof en Pollando detruis hitle-ranoj. Restis nur tiu tombo. Per komuna kantado de „La Espero”, la solenaĵo finiĝis.

Nepras substreki, ke la solenaĵoj ĉe la tombo de D-ro Zamenhof okazadis ĉiujare.

La 14an de decembro 1951, okaze de la 92a naskiĝdatreveno, okazis en la klubejo de varsovia Filio de AEP memor-vespero dediĉita al Zamenhof. En programo troviĝis solenaj paroladoj kaj deklamaĵoj. Pri tio en la revuo publikigis artikolon Jadwiga Rydygier.

Zofia Banet-Fornalowa

Nekrologo

Kun granda bedaŭro ni informas, ke la 10an de majo 2003 j. forpasis 69-aĝa, eminenta pola esperantisto Antoni Golonka.

Ĝis lastaj tagoj li aktivis en Esperanta movado. Li estis multjara ĉefdelegito de Universala Esperanto-Asocio por Pollando, membro de Ĉefa Estraro de Pola Esperanto-Asocio kaj kunlaboranto de Akademio Internacia San Marino.

Li edukis multajn E-generaciojn kiel altkvalita instruisto pri Esperanto.

Multfoje li gvidis divesgradajn Esperanto-kursojn kaj seminariojn en Międzygórze.

Li estis honorigita de Pola Kulturministerio kiel „Merita Kulturaganto”.

Pola Esperanto-Asocio honorigis lin per titolo „Merita Esperantisto”.

Antoni Golonka por ĉiam restos en memoro de multaj esperantistoj kiel fidela samideano kaj bona kolego.

Ĉefa Estraro

de Pola Esperanto-Asocio

Estimataj kolegoj, Estimataj samideanoj.

„*La vivo de homoj kiel la tuta estaĵo estas ligita kun naturo ekde komenco ĝis la fino — kaj tio estas nia eterneco*” — tion diris iam esperantisto, artisto kaj universitata profesoro de Silezia Politekniko — ano de AIS prof. Teodorowicz.

Sed homoj ligitaj kun Esperanto aŭ AIS-movado, restos inter ni pro sia granda peno, engaĝiĝo kaj fideleco al idealoj.

Homoj forpasas, la ideo restas kaj atendas plu daŭrigadon de posteuloj.

Tiuj pensoj venis al mi kiam mi eksciis pri la forpaso de nia estimata kaj kara Kolego, adiunkto sciencista de AIS, Bakalaŭro — Antoni Golonka.

Li mortis la 10an de majo en Gliwicea hospitalo. Postsekvis lin morto de lia edzino Lidia.

Ne nur por liaj infanoj Krzysztof, Artur kaj Beata morto de Antoni estas ne nur ŝoko sed precipe granda tristo.

A. Golonka kiel infano perdis patron (dum t.n. pacigado dum la II mondmilito. Pro tio li ĉiam serĉis eblecon por agi por la paco kaj justeco. Tion li trovis dum la soldata servo — ekkonante Esperanto-instruiston Eugeno Matvjejĉuk-Matkovski (pri Matkovski vidu la Esp. Krestomation).

Golonka estis instruisto de Esperanto, agis en la estraro de PEA

kaj estis longdaŭra ĉefdelegito de UEA por Pollando. Dum iu periodo li gvidis Esperantan Instituton ĉe Silezia Politekniko kaj varbis al kunlaborado sciencistojn ne nur el Gliwice sed ankaŭ de Silezia Scienca Instituto (prof. Pietrucha, doc R. Koppel, dr A. Tabacki, kunagis kun MT).

Li varbis ankaŭ anojn de la estraro de urbo Gliwice kaj de ĉefoj de skolta asocio. Ankaŭ kun sinjoroj Świstak kaj Pleśnar li eldonadis „TAMEN” — faman ĵurnalon pri kaj por Esperanto.

Por la esperantistaro de la tuta mondo li estis konata pro organizado de fama *Ora Pola Aŭtuno* kaj *Esperantaj Familiaj Renkontiĝoj* — en Międzygórze kaj kiel kunlaboranto de prof. Tyblewski de AIS kunorganizis aranĝojn de la pola filio de AIS en Krynica, Staszów kaj Białystok.

Multe li ankaŭ engaĝiĝis en Internaciaj Interlingvistikaj Seminaĵoj en Łódź, kaj pene kun la informadikistoj kaj specialistoj pri ETO de Silezia Politekniko en Gliwice li preparadis la E-vortaron. Tre bone pritaksita ne nur de prof. Szerdehey sed ankaŭ de AIS-komisiono dum bakalaŭra ekzamano, kiun li sukcesis *summa cum laude*.

Li ankaŭ helpis pri organizado de la Suprasilezia Branĉo de AIS.

Lastjare li jam malsanis, tamen absolute private kaj senpage vizitante emeritojn en kvartalo Sikor-

nik (kie li ankaŭ loĝis) gvidis por ili kaj por infanoj E-kursojn.

E. Prof. Doc. Alicja Lewanderska-Quednau

PS. Oni diras ofte pri homo aganto, sed evitas privatecon. Tamen oni devas iom menciigi pri personeco de Antoni (homo kiu komprenis alian homon kaj estis modesta sed ĉiam honesta). Ne memoru Golonka nur kiel esperantiston ageman sed en senco de pola kulturo — humanisto.

Por tio private mi devas ĉi tie aldoni — denove mian dankesprimon al li.

Ĉar post la subita morto de mia edzo Jerzy (E-amiko de Antoni) li estis ununura glivicea esperantisto kiu kun la (dumviva sed nun tre aĝa) sinjoro Kamiński okupiĝis pri miaj infanoj dum mi estis en hospitalo kaj ankaŭ helpis kun estraro de Silezia Politekniko — prizorgi la funebran feston.

Rilate al lia verko-vortaro, li ofte parolis kun mi pri ĝi, laste en februaro eĉ promesis finfari por prezenti ĝin kiel magistran disertacion en AIS.

Kara Antoni — la vivo forpasas, la ideo — por kiu Vi dediĉis la tutan vian vivon — de Dro Zamenhof restos kaj venkos — kaj ni neniam forgesos Vin.

Alicja kun infanoj kaj genepoj kaj nuna edzo, Prof. d-ro HD Quednau, Direktoro de AIS-Klerigofico

Praktika uzado de la „diabla vorto” PO

Forpasis jam 116 jaroj de la naskiĝo de Esperanto, sed ĝis nun multaj esperantistoj, ĉefe en okcidentaj landoj, malĝuste uzadas la prepozicion **po** aŭ tute evitas ĝin, por ne fari erarojn.

Konata franca esperantisto Andre Cherpillod dediĉis al tiu ĉi prepozicio sian vastan redaktaĵon „PO — la diabla vorto”, eldonitan en 1996 jaro. Li pravas, ke la lingvoj de okcidenteŭropanoj ne posedas simplan prepozicion, kiu estus preciza traduko de **po**. Pri funkciado de tiu ĉi vorteto, pli malfacila ol longa, okupiĝis jam pluraj gramatikistoj akceptante, ke ĝi estas **prepozicio**. Ni ankaŭ povas konstati, ke **po** respondas perfekte al **PIVa** difino de prepozicio. Ĉiuj slav-baltaj landoj havas prepozicion **po** kun pluraj signifoj. **Jen ekzemploj el pola kaj rusa lingvoj:**

Daŭem im **po** 10 złotych — Mi donis al ili **po** 10 zlotojn.

Uczniowie dostali **po** dwie pomarańcze — Gelernantoj ricevis **po** 2 oranĝojn.

Я ехал **по** десяти километров в час. — Mi veturis **po** 10 kilome-

troj en horo (aŭ hore).

Oni ofte klarigas, ke la prepozicio **po**, reganta nur numeralojn kun ĝenerala signifo, esprimas la distribuon aŭ dispartigon. **Fakte la egalaj partoj povas esti donataj, distribuataj, vendataj, aŭ inverse ricevataj, aĉetataj, ŝtelataj, ktp.**

- Oni povas doni **po** 10 zlotojn al kelkaj personoj, sed ankaŭ ricevi **po** 10 zlotojn de kelkaj personoj.

- Oni povas loĝi **po** du fojojn en kelkaj hoteloj, rabi **po** unu miliardon da zlotoj en du bankoj ktp.

La frazoj povas ankaŭ mencii dispartigon kaj nenion pli: La gastoj venis **po** tri.

Aperas tamen demando dum skribado de la jenaj frazoj: Li ŝtelis en poluraj bibliotekoj **po** du libroj(n). Ili ricevis de mi **po** kvin pomoj(n).

Ĉu oni devas akuzativigi „libroj” kaj „pomoj”?

- **NE**, respondas kelkaj, ĉar **po** estas prepozicio kaj postulas nominativon, kiel ĉiuj prepozicioj. (L. Zamenhof ankaŭ ĉiam uzis nominativon).

• **JES**, asertas aliaj, ĉar **po** rilatas nur **al numeralo** kaj ne al libroj ŝtelitaj. La libroj estas rekta objekto de **ŝtelis** kaj pomoj estas rekta objekto de **ricevis**, ili do devas akuzativiĝi. L. Zamenhof nur unu fojon uzis akuzativon. Tiu ĉi problemeto ekzistas ĝis nun kaj fakte estas du manieroj en la uzado de **po**:

la **ĝusta**, fundamenta (Zamenhofa, uzata de slavoj), kaj la **erara**, sufiĉe ofte uzata de esperantistoj en ĉiuj okcidentaj landoj.

La sola regulo estas tamen, ke **po** rilatas ĉiam al **numeralo** aŭ almenaŭ al vorto **nombrosignifa**, kiel **paro** (2), **pluraj** (nedifinita nombro), **skatolo** (ekz. de 20 pecoj) ktp. La fakton, ke **po** neniel rilatas al ia ideo de donado aŭ distribuado montras la jena frazo: Mi ricevis **po** tri pomojn de **po** du infanoj (de ĉiu grupo de du infanoj mi ricevis aron de tri pomoj).

Ni prikonsideru nun al kiu vorto rilatas la prepozicio „po” en la frazoj:

• **Po** tri policianoj gardis la pordojn (ĉe ĉiu pordo staris grupo de 3 policianoj).

• **Po** du boteloj da vino staris sur la tabloj (sur ĉiu tablo staris 2 boteloj da vino).

• **Po** kvar esperantistoj sidis ĉe la manĝotabloj (ĉe ĉiu manĝotablo sidis 4 esperantistoj).

Oni povas diri en la unua momento, ke la prepozicio **po** rilatas al **tri policianoj**, al du boteloj, al kvar esperantistoj, sed post ioma pripensado ni konstatas, ke **po** rilatas nur al numeraloj **tri**, **du**, **kvar** kaj tute ne rilatas al la substantivoj: policianoj, boteloj, esperantistoj. Se oni ŝanĝas la lokon de **tri**, oni devas ankaŭ ŝanĝi la lokon de **po**:

Policianoj gardis la pordojn, **po tri**; aŭ **po tri** ili gardis la pordojn.

Same aspektas la situacio en aliaj frazoj, ekz.: Mi donis al ili **po tri** pomojn. Mi donis al ili pomojn **po tri**. (Nenia diferenco, eĉ nenia nuanco estas inter la frazoj).

La saman fenomenon oni renkontas kun 4 aliaj prepozicioj: **ĉirkaŭ**, **ĝis**, **inter**, **super**.

Ili rilatas ankaŭ nur al la numeralo, kaj ne al la substantiva objekto, kiu alprenas do akuzativon, ekz.:

• Mi bezonas nur **ĉirkaŭ** 200 zlotojn (zlotojn, **ĉirkaŭ** 200).

• La ĉambroj povas loki en si nur du **ĝis** kvar homojn (homojn, **ĝis** kvar).

• Pollando sendis al Irako **inter** cent kaj ducent soldatojn.

• Mi vidis en Mielno **super** cent esperantistojn (esperantistojn, super cent).

Respekte al E-Fundamento pluraj esperantistoj uzas la nominativon post „po”:

1. Al ĉiu lernanto mi donis **po** du libroj.

2. Gesamideanoj ricevis **po** kvin Esperantaj glumarkoj.

Respekte al logiko multaj esperantistoj uzas la akuzativon en jenaj frazoj:

1. Miaj gefiloj ricevis **po** cent zlotojn.

2. Ili eltrinkis **po** du botelojn da biero.

3. Estas sanige trinki ĉiutage **po** tri glasojn da sengasa minerala akvo.

En Plena Analiza Gramatiko de Esperanto estas skribite:

• Mi ricevis kvin frankojn de **po** du membroj.

• Mi ricevis **po** kvin frankojn de **po** du membroj.

Rimarko: La signifo de ambaŭ frazoj estas la sama, sed kun la duobla **po** la kompreno estas pli facila.

Oni povas rimarki, ke slavlingvanoj (ankaŭ L. Zamenhof) ofte uzas anstataŭ **po unu** simplan **po**, kvankam ĝi rilatas al **unu**. Ekz.: Ili trinkis **po** glaso da vino (post **po** ne troviĝas nombro **unu**).

Ekzemploj kun uzo de la nominativo:

• Al ĉiu el la lernantoj instruisto donis **po** tri libroj. Ili ricevis **po** tri libroj.

• Ili havis sur manoj kaj sur pie-

doj **po** ses fingroj (sume dudek kvar).

• Se mi legos en ĉiu tago **po** 15 paĝoj, mi finos la tutan libron en 4 tagoj.

• Mi enmiksitis medikamenton **po** unu kulero en litron.

Ekzemploj, kun uzo de la akuzativo:

• La du laboristoj ricevis **po** 100 zlotojn (ĉiu laboristo ricevis 100 zlotojn).

• Mi ordonis al ambaŭ trinki **po** kvar glasojn da minerala akvo.

• La gastoj eltrinkis **po** du botelojn da biero.

En Plena Analiza Gramatiko estas skribite:

„Ĉar **po** ne rilatas al la substantivo, ĉi tiun ĝi ne povas influi gramatike, do post **po** la rektobjektan substantivon oni devas meti en akuzativon: ekz.: ili ricevis **po** kvin pomojn”. Multaj bonaj aŭtoroj uzas ja akuzativon kaj ankaŭ L. L. Zamenhof en 1891 j. skribis: „**Estas malfacile ankoraŭ diri, kiu (akuzativo aŭ nominativo) estas pli bona, kaj tial ambaŭ estas uzeblaj kaj bonaj**”.

Pluraj esperantistoj solvis por si la aferon tiel, ke ili simple evitas la po-esprimon. Tiu evito estas ĉiam ebla. **Anstataŭ skribi:** Ili ricevis **po** kvin pomojn — **oni povas skribi:** Ĉiu el ili ricevis kvin pomojn. Ĉiu el gastoj eltrinkis du botelojn da biero, ktp.

Oni povas ankaŭ uzi **po** kiel **prefikson**, kaj tio estus la plej simpla

solvo de la problemo, ekz.: Ili ricevis po–kvin pomojn.

Aliaj ekzemploj kun la praktika uzado de „po”–prepozicio:

- Ŝi kudras **po** dek horoj ĉiutage kaj li laboras **po** ok horoj tage (**taĝe** estas tamen malpli preciza ol ĉiutage).

- Kvin el la apartamentoj konsistas el **po** tri ĉambroj (da ĉambroj estas 15).

- Oni povas nokti en Mielno **po** 35 zlotoj (ĉiu nokto kostas 35 zlotojn).

- Soldatoj marŝis **po** kvar en ĉiu vico (t.e. ili marŝis kvarope en vicoj).

- Pilgrimantoj iris **po** 30 kilometrojn tage (**malĝusta formo estas:** ili iris tridek kilometrojn po tage).

- Mi prenas la medikamenton **po** 10 gutoj antaŭ ĉiu manĝo.

- Oni vendas tiujn cigaredojn **po** dudek pecoj (...**po** skatolo).

El la prepozicio „po” oni povas pluformi multajn vortojn, ekz.:

- Du studentoj gajnis **poan** milionon da zlotoj (zlotojn **po** miliono, aŭ ĉiu el du studentoj gajnis unu milionon da zlotoj).

- Tri studentinoj havis **poe** plurajn amantojn (ĉiu el 3 studentinoj havis **poe** plurajn amantojn).

- En tiu–ĉi butikoj oni vendas **po–grande** (hurtem) kaj en aliaj **pode–tale**.

- La grandan torton ni formanĝis **popece** (po kawaĵku).

- Mi prenis tiun ĉi medikamen-

ton **pogute** (po kropli) kaj tablojdon **poduone**.

- Multaj lernas Esperanton la tutan vivon **poiom(e)**.

- Multajn muzeojn oni vizitas nur **pogrupe**.

- Tiun ĉi vinon oni vendas nur **politre**.

Rimarko: La sube skribitaj frazoj estas malĝustaj:

Enmiksi unu kuleron **politre**; aŭ: enmiksi unu kuleron **po** litro.

Jen korekte skribita frazo: Enmiksi **po** unu kulero(n) en litron.

Malĝustaj estas ankaŭ la esprimoj: popersone, pojare, pohore ktp.

Jen korekte skribitaj frazoj: Mi veturis kun la rapideco de 80 kilometroj hore (80 km/h).

Enirbileto kostis 50 zlotojn je persono; aŭ: ...por unu persono.

Finaj konkludoj.

- La vorto **po** estas dispartiga prepozicio.

- Ĝi rilatas ĉiam al kvoto, nombro aŭ mezuresprimo, kiu indikas el kiom da unuoj konsistas la egalaj partoj de la dispartigo.

- Kiam la dispartigota aro estas rekta objekto, la logiko postulas la **akuzativon**, sed la Zamenhofa tradicio postulas **nominativon**. La ĝustan formon ĉiu devas elekti mem, post ioma prikonsidero.

Mia (kaj onia) Esperanto-kurso. Kion ĝi enhavu?

Antaŭ jaroj mi ekzameniĝis por akiri rajton por instruado de Esperanto. Tio donis al mi pluajn instigojn por tiu instruado. Pli frue mi studis pedagogion en universitato krom aliaj specialecoj. Mi konstatis, ke ĉio, kion oni scias kaj lernis, estas tre uzebla dum instruado de Esperanto ĉar tio koncernas la vivon.

Instruadon de Esperanto mi ĉiam traktis tre grava kaj respondeca, ĉar ĝi prosperigas kaj evoluigas E-movadon. Nun la malfortigita E-movado postulas kaj bezonas specialajn kaj pli intensajn instruistajn agojn. Pro tio oni ne preterlasu ajnajjn, valorajn materialojn aŭ ŝancojn por organizi kaj gvidi instruadon de Esperanto. Verbado por kursoj de Esperanto estas aparta kaj specifa temo kaj mi ne intencas skribi pri tio ĉi tie, sed eble alio-kaze.

Gekursanoj, se ili jam estas, intencas lerni Esperanton pro diversaj kaŭzoj, konataj al ili, kaj cetere valoras sciigi de ili pri tiuj kaŭzoj.

Kursgvidanto tamen, konscia E-aktivulo, devas fari el ili ne nur homojn konantajn la lingvon, sed samtempe verajn kaj kreivajn espe-

rantistojn, do samideanojn kleraj pri internacilingva problemaro. Pro tio, oni povas konstati, ke kursa instruado devas okazi dukanale. Unue korekta kaj interesa instruado, kaj due transdono de scioj, kiujn diktas kreiva E-filozofio (esperantozofio). Pri ĝi skribadas ĉefe la prezidanto de Filozofia E-Asocio Tutmonda, prof. Evaldo Pauli de la Universitato de Florianopolis, kaj ankaŭ aliaj aŭtoroj, kiel ekz. filozofo prof. Jiří Karen (Ĉeĥio) aŭ prof. Albert Godheir (Britio). Temas ĉefe pri apologio de Esperanto, do pri justa pledo por Esperanto per monstro de ĝiaj grandaj valoroj. Gekursanoj devas sciigi pri la enhavo de tre grava kaj baza E-filozofia dokumento, nome pri la Deklaracio pri Esperantismo, akceptita dum la unua, monda E-kongreso en Boulogne-sur-Mare en 1905, kaj pri aliaj tre gravaj aktoj de E-filozofio, koncize kaj klare.

Estas diversaj, vere gravaj sciigoj por gekursanoj, ekzemple, ke Esperanto ne estas la lingvo fremda, sed ke ĝi estas propra lingvo de ĉiu homo, ĉar la aŭtoro donacis ĝin al ĉiuj.

Tre grava estas la scio pri tuta

neŭtraleco de la lingvo Esperanto, kaj ankaŭ tio, ke Esperanto ne diskriminacias aliajn lingvojn kaj naciajn ambiciojn, ke ĝi tute neŭtrale servas al ĉiuj homoj apud aliaj, naciaj lingvoj.

Gekursanoj devas sciigi (ĉar plej ofte ili nek scias, nek konscias) pri ekzistanta, maljusta situacio en Internacia Lingva Komunikado (ILK), ke kelkaj „gravaj” lingvoj naciaj maljuste dominas en la mondo kaj kaŭzas lingvan kaj ne nur lingvan hegemonion en la mondo. Tio tre akre estas videbla en Eŭropo. Esperanto prezentas sin kiel justa solvo de la problemo.

Aliaj E-filozofiaj veroj estas ankaŭ transdonendaj al gekursanoj, kiel ekzemple tio, ke la relativa artifariteco (planiteco) de Esperanto estas nur kaj profunde eĉ pozitiva eco de la lingvo, ĉar dank’ al tio Esperanto estas facila, logika kaj neŭtrala; ĝi enportas lingvan, tre dezirindan, neŭtralecon.

Dum diversaj kursoj mi konstatis, ke miaj kvazaŭ marĝenaj informoj pri tiuj aferoj estis tre bone kaj volonte akceptitaj fare de la gekursanoj kaj okazis eĉ diskutoj kaj fruktaj alparoloj.

Vero ĉiam plenumas valoran edukon kaj en instruado de Esperanto ĝi havas specialan signifon. Homoj akceptas tion kun intereso kaj agrablo. Tuj facileco de Esperanto samtempe ludas suplemente kaj iĝas vere esperantista etoso, kiu

regas en la Esperanto-movado.

Gravas ankaŭ sciigi al gekursanoj pri signifaj verkoj, kiuj koncernas uzon de Esperanto. Kio estas necesa ne povas esti preterlasata en la kuro de instruado de Esperanto: tiuj verkoj kiel la plej grava vortaro „PIV” aŭ „La Fundamento” devas esti konataj al gekursanoj almenaŭ per unufoja monstro dum ĉiu E-kurso.

Jen mi pretas indiki la plej ĉefajn prezentaĵojn kaj temojn, pri kiuj geïnstruistoj devas memori kaj enprogramigi:

- Ekzisto kaj uzendo de la Fundamento de Esperanto.
- Ekzisto kaj uzendo de la plej signifiva vortaro PIV.
- Funkciado de Esperanto-movado laŭ ĝia doktrino.
- Utileco de Esperanto kaj de la movado.
- Atrakcieco de Esperanto kaj de la movado, korespondado, feriado, kongresoj, forumoj, kulturaranĝoj.
- Universitata studado de esperantologio kaj interlingvistiko.
- Efiikeco de uzo de Esperanto, lernrapideco, facila elparolo kaj skribado, racieco de Esperanto.
- Ekzisto kaj karaktero de E-kulturo, kiu gravas por vastigado de Esperanto kaj aldonas rangon al Esperanto.
- Esperanta, vastampleksa literaturo kiel parto de E-kulturo.
- Celoj de Esperanto en la mondo, funkciado de UEA kaj aliaj or-

ganizajoj.

- Kluba E-aktivado, ĝia signifo.
- Potenca ĉeesto de Esperanto en interreto.
- Esperantaj radioprogramoj (Varsovio, Romo, Vatikano k.a.).
- Esperanta gazetaro, magazinoj, eldonaĵoj.
- Funkciado de Pasporta Servo — turismo faciligita.
- Porpersona signifo de Esperanto.

Dum lecionoj de Esperanto gekursanoj povas kaj eĉ devus prezenti siajn ĝisnunajn sciojn de la lingvo. Tio kaŭzas, ke ili kreas kaj ĉerpas pluan entuziasmon por daŭra, lingva perfektigo.

Instruisto kreas specifan etoson dum la kurso, kaj tio estas lia/ŝia devo, kiu dependas de personaj scipovoj. Tiu esperantista etoso ofte radias eĉ eksteren por aliaj homoj, kiuj sciigas pri tio de la gekursanoj.

Hejmaj, lingvaj taskoj estas necesaj, ĉar ili garantias metodikan kontinuaĵon de lernado.

Konversacioj esperantlingvaj eĉ simplaj dum lecionoj donas al gekursanoj emociojn kaj ligas ilin kun la kurso kaj kun la E-movado samtempe. Tio atrakciigas lecionojn.

Jam frue valoras ligi korespondadon (ankaŭ grupan), poŝte aŭ rete, kun iu eksterlanda kurso de Esperanto; tio tre kolorigas kursan laboron kaj ĝojigas gekursanojn. Mi faras tion ĉiam dum miaj kursoj kaj ĉiam tio aldonas valorojn kaj atrak-

ciecon al okazigata kurso.

Finaj atestoj post kompletigo de kurso de ĉiu grado estas tre dezirindaj kaj eĉ necesaj, ĉar ĉiu atesto-posedanto imagas kaj kredas, ke li/ŝi konas jam la lingvon Esperanto kaj do estas jam vera... esperantisto!

Memkompreneble, preparo de ĉiu leciono estas necesa por bona, harmonia kaj efika kuro de ĉiuj lecionoj.

Mia multjara praktiko en instruado de Esperanto pravas, ke ĉiuj ĉi supraj indikoj estas vere valoraj kaj helpas; ili efikigas instruadon.

Esperanto ĉiam estas atrakcia kaj tio influas al homoj kaj donas eblecojn por plua, efika vastigado de la Esperanto-movado.

mag. Józef R. Waliszewski
Toruń, marto 2003



Vizito de portugalaĵ instruistoj en Koszalin

En la tagoj 7–10 de majo 2003 j. estis gastigitaj en Koszalin 3 portugalaĵ instruistoj: Julieta LOPES, Joao Carreiro kaj Luis LADEIRA — ĉeforganizinto de interlerneja kunlaborado inter 4 eŭropaj gimnazioj (en Portugalio, Hispanio, Hungario kaj Pollando). Tiu ĉi kunlaborado, organizita kadre de SOCRATES-COMENIUS projekto, komenciĝos fakte la unuan de septembro 2003 jaro, sed jam nun daŭras preparlabo-

roj. *Instruistoj de kvar lernejoj diligente lernas Esperanton, por instrui la lingvon internacian ekde la nova lernojaro. La instruistoj el Portugalio, kiel koordinantoj de interlerneja kunlaborado per Esperanto, vizitis laŭvice ĉiujn partnerajn lernejojn, por pridiskuti la metodojn de lingvoinstruado kaj formojn de kunlaborado (korespondado, kreado de retpaĝoj, parola kaj vida komunikado, interŝanĝo de kulturaj kaj historiaj spertoj, reciproka vizitado de instruistoj kaj gelernantoj ktp.).*

La vizito de portugalaj esperantistoj en Koszalin estis vere fruktodona. La direktorino de Gimnazio N-ro 7 Urszula Monkiewicz kune kun pedagogia konsilantaro kaj gelernantoj gastame akceptis la delegacion de portugalaj geinstruistoj el Pontinha apud Lisbono. Estis preparita por ili interesa kaj riĉa restadprogramo en kiu troviĝis inter alie: konatiĝo kun funkciado de koŝalina gimnazio, renkontiĝo kun gelernantoj, laborkunsidoj kun direktorino kaj kun instruistinoj celantaj al konkretigo de laborplano por 2 jaroj. Tre interesa estis ilia vizito en komputila laborejo, kie gelernantoj okupiĝos pri elektronika korespondado en Esperanto kaj pri kreado de retpaĝaro por publikigi siajn sukcesojn en la lernado de la lingvo internacia. La restadon de portugalaj instruistoj en la lernejo agrabligis ĉiutagaj promenoj tra Koszalin. La gastoj estis vere ra-

vitaj pro ĉio, kion ili ekvidis dum la urbovizitado. Impresplena estis ilia vizito en la plej moderna komerca kaj distra centro, konstruita pasintjare en la norda urbokvartalo. Ili faris ankaŭ memorigajn fotojn ĉe la memorŝtono omaĝe al D-ro Ludoviko Zamenhof (malkovrita en 1969 jaro) kaj antaŭ Kverko de paco plantita de ĈEP-partoprenintoj en 1978 jaro. De sur alta panoramturno sur Chełmska Monto ili admiris la tutan urbon kaj ĝian ĉirkaŭaĵon kun multaj ripozlokoj en la marborda zono.

Ege plaĉis al ili pitoreske situanta ripozloko Mielno kaj posttagmeza kafumado en la Sukcena Palaco Strzekecin, troviĝanta sude de Koszalin. Tie ili faris multajn fotojn, admirante la imponan gotikan konstruaĵon el la fino de la XIX jc. kun belega parko kaj lago.

La gastoj estis akompanataj ĉiutage de du gimnaziaj instruistinoj kaj de prezidanto de koŝalina filio de PEA, okupiĝanta jam de multaj jaroj pri ĉiĉerona laboro.

Neforgeseblajn impresojn donis al la gastoj bone preparita dancvespero, partoprenita de la tuta pedagogia konsilantaro, kaj adiaŭa vespero en la loĝejo de la lernejestrino, paroprenita de 10 personoj. Ĉiujn solenaĵojn mi ankaŭ partoprenis, plenumante la rolon de tradukanto.

Karaj geamikoj,

vi certe scias ke ILEI/UEA havas programon pri internaciaj ekzamenoj. Se oni kunmetas tiujn ekzamenojn kun la naciaj, unuagradaj ekzamenoj, oni havas kvar-ŝtupan sistemon:

1. nacilingva, enkonduka
2. internacilingva, elementa
3. internacilingva, meza
4. internacilingva, porinstruista.

(Por simpligi, ni preteratentu nun la fakton, ke en pluraj landoj kun granda Esperanta tradicio, la nacia ekzamenstemo estas pli malpli paralela al ĉi tiu.)

Kompreni tion, la kvarnivelan sistemon, jam estas io. Kompreninte tion, kelkaj aktivuloj de ILEI kaj UEA provis vidi, kio ekzistas en la mondo kaj en la reto. Oni tuj vidis, ke en la reala mondo estas multo, sed en la reto ne estas multo, KROM pri la enkonduka, nacilingva kurso, kiu povus porti al nacilingva ekzameno.

Pri la aliaj niveloj ekzistas nur la priskriba broŝuro de ILEI/UEA (kiun vi trovas ankaŭ en www.edukado.net), kaj kompreneble ekzistas la Internacia Ekzamena Komisiono, kiu administras la internaciajn ekzamenojn. La 4a nivelo estas ankoraŭ en sia komenca fazo. La unua seminario okazas en junio en Ĉaĉak, Serbujo. Aliaj sekvos. En ĉi tiu kampo agas, evidente, ankaŭ la universitatoj, en kiuj oni instruas interlin-

gvistikon kaj esperantologion.

Sed, finfine, se vi estas iranano, kiu volas lerni Esperanton bone kaj eventuale volas havi la mezan internacian diplomon, vi ne havas multon je via dispono (tio, kio ekzistas, estas montrata en tiuj paĝoj).

Pro tio, kunlabore kun Enrike ElleMBERG, estis faritaj kaj kunlabore kun Jozefo NEMETH, la reaktoro de *Internacia Pedagogia Revuo* de ILEI, estis enmetitaj en la paĝaro de IPR ĉi tiuj paĝoj: www.nl-papa.hu/ipr/esperanto_instruado.htm.

Mi afable sed firme petas vin vizi tiujn paĝojn, por vidi kiom multe restas por fari, kaj por alvoki al kunlaboro. Se vi estas instruisto, se vi ŝatas verki retajn kursojn, se vi kapablas fari retajn paĝojn, bonvolu kontakti min aŭ la estraron pri edukado de UEA, Gbeglo Koffi, esp.togo@cafe.tg, aŭ la estraranojn de ILEI.

Dankon!

Renato Corsetti

Ĝus aperis „Esperanto Junul-Kurso”, lernolibro originale eldonita de SAT-Amikaro en la jaro 1952. La 80-paĝa, riĉe ilustrita libro, enhavas dudek lecionojn, kun konsiloj por kursgvidantoj. Al tio aldoniĝas broŝurforme gramatika helpilo por instruistoj. Ĉiuj lecionoj estas tute en Esperanto, prilaboritaj laŭ rekta metodo de instruado.

Internacia prezo 6 EUR kun triona rabato por tri aŭ pli da ekzempleroj. Por kursoj organizataj en Pollando la prezo egalas al 14 PLZ. Mendu ĉe la Eldonejo HEJME.

Biografieto de Andreo CSEH kaj Internacia Esperanto-Instituto

Andreas CSEH (aŭ Andreo Ĉe, laŭ lia propra skribmaniero) naskiĝis la 12an de septembro 1895 en Marosludas (Hungario). Post 1918 la urbo nomiĝas Luduŝ kaj hodiaŭ ĝi troviĝas en Rumanio.

Esperantisto de 1910, li pastrigis en 1919. Per anonco en gazeto li konatiĝis kun Esperanto, tuj lernis la lingvon kaj intense okupiĝis pri ĝi. Diskonigante Esperanton li baldaŭ komprenis, ke la bazo por ĝia disvastiĝo estas instruado. En 1920 en la urbo Sibiu li organizis kurson por diversnaciaj laboristoj. La cirkonstancoj devigis lin instrui sen lernolibroj. Pro manko de ili (estis ĵus post la unua mondmilito) li uzis la rektan metodon. Tiu laboro tiom ensorbis lin, ke en 1924 li ricevis permeson de sia episkopo por tute dediĉi sin al Esperanto. Li fariĝis sekretario de la Internacia Centra Komitato de la E-Movado en Ĝenevo kaj kunlaboris en la organizado de la Universalaj Kongresoj en Ĝenevo, Gdansko kaj Budapeŝto. Dum tiu lasta kongreso li gvidis sian unuan pedagogian kurson.

Poste sekvis lia triumfa aposto-

lado tra diversaj landoj, dum kiu li varbis milojn da novaj adeptoj por la lingvo, donis inspiran impulson al la iamaj Esperantistoj kaj akiris simpatian de nenombrelaj aŭtoritatuloj.

En 1927 li estis invitita de la urbestro de Stokholm kaj la reĝa princo Karlo por gvidi E-kursojn en Svedio, inter alie ankaŭ en la sveda parlamento.

En aprilo 1929 aperis la unua eldono de lia kurso en libra formo, stenografita kaj eldonita de la Sveda Instruista Federacio en Stokholmo.

Gvidinte kursojn en Estonio, Francio, Germanio, Latvio, Nederlando, Norvegio, Pollando kaj Svislando, li en 1930 definitive ekloĝis en Nederlando. Tiam kreskis la bezono de porinstruantaj kursoj. Andreo Cseh iniciatis ilin kaj okazigis internaciajn pedagogiajn seminariojn, unue en Budapeŝto (1929) kaj poste en Arnhem (Nederlando) dum multaj jaroj.

En 1930 Cseh kun gesinjoroj Isbrucker fondis en Arnhem la Internacian Cseh-Instituton de Esperanto, kiu en 1933 translokiĝis al propra domo en Den Haag. Ek-



de 1952 la Instituto portas la nomon Internacia Esperanto-Instituto (IEI).

En 1932 Cseh komencis redakti kaj eldoni la revuon „La Praktiko”, destinitan al komencantoj kaj progresantoj, sed kun altnivela lingvo-uzo. Tio estis io nova en la Movado, ĉar antaŭe ne ekzistis revuo kun facila kaj altnivela lingvaĵo. Pro la pedagogia bazo, kiun Cseh donis al tiu revuo, ĝi populariĝis kaj estis vastskale legata.

Alia atingo de Cseh estis la fondo de la Universala Ligo (UL) en 1942 kun propra Esperanta monunuo, la Stelo, oficiale akceptita de bankoj. Ekzistis moneroj de 1,- (bronzaj), 5,- (latunaj), 10,- (kupronikela) kaj, post 1965, 25,- steloj (du specoj, nikela kaj arĝenta). Kiam la agado de IEI kaj UL malpli intensiĝis, la stelo perdis sian universalan funkcion.

La lastajn jarojn de sia vivo Cseh pasigis en pensiono por maljunuloj, kie li mortis la 9an de marto 1979. Li estis entombigita en Den Haag.

IEI estis fondita la 24an de majo 1930 en Den Haag kaj ĝi daŭrigas la laboron de Andreo Cseh, diskoniĝante lian metodon de instruado.

IEI organizas Seminariojn por trejni novajn Cseh-metodajn instruistojn kaj disponigas al ili tiucelan materialon. La seminaria sistemo de la IEI estas programo celanta eduki instruistojn en la uzo de la rekta metodo kaj ĝi konsistas el du diversaj gradoj: Enkonduka kaj

Diplomiga. La programojn de la seminarioj, ekzamenan regularon kaj aliajn informojn rilate la partoprenon en Cseh-seminarioj petu ĉe IEI.

La kandidatoj, kiuj sukcese trapasas la diplomigan ekzamenon, estas enskribitaj en la registroj de instruistoj de IEI kaj rajtas gvidi Cseh-kursojn ĉie en la mondo laŭ invito de E-grupoj.

Ekde 1991, responde al la bezono havi pli da gvidantoj de Cseh-seminarioj IEI komencis trejni ilin. Kiu deziras atingi la kompetentcon gvidi Cseh-seminariojn, devas esti diplomita Cseh-instruisto kaj posedi landan aŭ internacian ateston de profesia fremdlingva instruisto.

Atilio ORELLANA ROJAS
Novembro 2002

La Internacia Esperanto-Instituto (IEI) ĵus lanĉis al la merkato sian novan eldonaĵon: „Vivo de Andreo Cseh” de Ed Borsboom.

Ĉi tiu nuna verko temas pri la vivo de Cseh kaj parte pri tiu de Julia Isbrucker. Cetere, ĝi estas ne nur la unua biografio pri la legenda pedagogo, sed ankaŭ dokumento pri ĉapitroj el la Esperanto-historio.

La verko estas mendebla ĉe IEI kontraŭ EUR 18,00 + sendokostoj. Triona rabato ekde 3 ekzempleroj.

[red.] Baldaŭ ni aperigos la recenzon de la libro.

★ INTERNACIA ESPERANTO INSTITUTO ★

Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.
☎ +31 70 355 66 77 2 +31 70 358 44 22 📧 <iei001@tiscali.nl>
Poŝtkonto 162626. UEA-konto: iein-q

Kio estas Cseh-metodo?

La Cseh-metodo estas sistemo por lerni la lingvon Esperanto kaj ĝin iniciatis Andreo CSEH (1895–1979). Li donis la nomon al metodo, kiu fariĝis vaste konata en la Esperanto-medio.

Sed, kio estas ĝi? El kio ĝi konsistas? Cseh-metodo estas kombinaĵo de la gramatika kaj la rekta metodoj kaj konformiĝas al la specialaj ecoj, kiujn la lingvo Esperanto havas. Dum en naciaj lingvoj la gramatiko estas plurfoje konfuziga labirinto, en Esperanto ĝi estas tiom klara, ke ne necesas eviti ĝian instruadon. Andreo CSEH, do, ordigis la instruitajn gramatikaĵojn en sistema gradigita sinsekvo kaj instruis ilin. Lia klopodo celis ne nur prezenti la gramatikajn elementojn kaj regulojn, sed ankaŭ klarigi ilin.

Ne mirigas, ke Andreo CSEH ne prezentis en siaj kursoj gramatikan terminaron. Li nur uzis la diversajn elementojn de la lingvo kaj konsideris, ke tia etapo de pli profunda analizo kaj lernado de la koncerna gramatika vorttrezoro estas tasko farebla ne en iu porko-

mencanta kurso.

En la Cseh-metodo ne estas komparoj inter la reguloj de Esperanto kaj la aliaj lingvoj, sed la instruisto montras la kutiman sinsekvon de la gramatikaĵoj en la frazoj en Esperanto.

Oni klopodas konduki la lernantojn al tio, ke ili mem eltrovu la solvon de la gramatikaj problemoj kaj ke ili mem konstatu la regulojn. La efiko de tiu procedo estas, ke la lernanto streĉas sian atenton kaj pensadon, ĝojas pro sia eltrovo kaj tiu travivaĵo utile servas la komprenon kaj memoron.

La rekta metodo donas grandan avantaĝon, nome, la tujan paroladon, la instigon pensi en la lernata lingvo, bonan kaj facilan perceptadon, ktp.

La tuta kurso okazas sub la devizo „paroligu la lernantojn!” Cseh kutimis diri, ke li gvidis „konversaciojn”, ne „kursojn”. Tial la lernantoj devas paroli pli multe ol la instruisto mem.

Grave estas, ke en la kursoj laŭ Cseh-metodo la naciaj lingvoj ne ludas rolon en la klasĉambro. La in-

LETEROJ, POLEMIKOJ, EVENTOJ...

Redaktas niaj legantoj

Pola Esperantisto reaperis

Kun vera ĝojo ni bonvenigis la reaperon de longe atendata „Pola Esperantisto”. Ĉiuj geklubanoj (en Krzeszowice) post rapida trarigardo transdonadis unu al la alia la ekzempleon, esprimante spontane diversajn rimarkojn. Oni pozitive opiniis la elegante aspektantan poligrafion, grafikon, formaton kaj preslitojn. La redakciaro garantias la altnivelon de publikigitaj materialoj, pri kio mi baldaŭ konvinkiĝis traleginte kun atento la tutan revuon.

Kompreneble, la enhavo de iuj

artikoloj postulas pli profundan pridiskuton, ŝajnas, ke la tuta pola esperantistaro estas devanta partopreni en diskuto pri estonta strukturo de la movado. Instigas al tio interalie, la mesaĝo de Renato Corsetti, Stanisław Mandrak, kiel ankaŭ vortoj de la ĉefredaktoro Kazimierz Leja. Mi, kiel relative nova esperantisto, kun apenaŭ kelkjara staĝo, ne tro bone orientiĝas en komplikaj meandroj de reciprokaj, personaj kaj asociaj rankoroj, tamen, mi opinias ke oni devus unue klare kaj sincere difini ĉiujn kaŭzojn kaj aspektojn malebligantajn ko-



struisto instruas rekte en Esperanto jam en la unua renkontiĝo kaj per tio la kursanoj lernas pensi rekte en la lernata lingvo. La lecionoj estas tiel konstruitaj, ke la vortprovizo necesa por posta klarigado estas jam pli frue enkondukita.

Kapti la atenton de la lernantaro, jen la ĉefa tasko de la instruisto! Ĝi estas la plej grava kondiĉo por la sukceso. Por ne skribi sur akvon, sed ĉizi sur ŝtonon, Andreo Cseh ligis ĉiun instruaĵon al agrabla, amuzativa travivaĵo. Tiel la instruitaĵon oni

fiksas kaj tenas en la memoro pli firme.

Malgraŭ la paso de la jaroj kaj la eltrovo de novaj metodoj kaj teknikoj por lingvolernado en Esperanto, la Cseh-metodo estas daŭre uzata vaste en la mondo per la konvenaj aktualigoj, adaptoj kaj modernigoj necesaj al la nuntempo. Per ĝi ĉiun jaron centojn da lernantoj faras siajn unuajn paŝojn en Esperanton.

Atilio ORELLANA ROJAS

**Direktoro
marto 2002**

munan agadon. Mi pensas, ke „Pola Esperantisto” akcelos la solvon de la problemaro. La tempo favoras nin. Du jaroj antaŭ elpaŝo al la Eŭropa Unio, disponante plene je ĉiuj modernaj medioj — E-programo en la Pola Radio, gazetaro, interreto, ne limigitaj per iu ajn cenzuro, ni, kiel neniam en la historio, havas neripe-teblan ŝancon memdifini sin kaj decidi — ĉu daŭre dum klubaj renkontoj sorbi teeton kaj krokodili pri vetero, aŭ finfine komenci komune kondukti kreative kaj iamaniere (laŭ niaj modestaj eblecoj) influu kvaliton de nia vivo.

Do, tute ne ŝajnas al mi, ke kol. Kazimierz Leja entreprenis taskon de reapero de „Pola Esperantisto” en tre malfavoraj cirkonstancoj. Kontraŭe, ne mankas papero, ĝi estas diversspeca, malmultekosta, teknikaj eblecoj de moderna presado ne kompareblaj kun hieraŭaj, sperto, dinamismo kaj optimismo de la ĉefa redaktoro (kiu ja estas profesia eldonisto) vekas la plej bonajn prognozojn. Mi ripetas: neniam estis pli bonaj cirkonstancoj. Bonvolu serioze preni al si vortojn de Renato Corsetti pri metodoj de Eŭropa Komisiono en Bruselo. Neniam en historio Esperanto estis tiel bezonata, kiel nuntempe. Kun atento kaj simpatio mi observas (kiel abonanto de „Litova Stelo”) la obstinan kaj fruktodonan agadon de litovaj esperantistoj. Ankaŭ la rondo de samideanoj arigitaj ĉe „La Ondo de

Esperanto” kaj iliaj najbaroj el Malbork, Olsztyn, Białystok montras kiel formi Esperantujon.

Nun mi mencias ege interesan eseon de Zbigniew Galor pri perfekta esperantista civitano. La eseo meritas apartan pridiskuton.

Rigardante la unuan numeron de la revuo mi nepre volis trovi ion kritikeblan. Kaj mi trovis. Kun mi-ro mi tralegis: jaro 97. Ĉu vere? Ĉu en mia mano troviĝas la plej longe aperanta E-revuo? Ne „Katolika Espero”, ne „Espeanto”, ne „Heroldo” sed nia kara „Pola Esperantisto”? Post longa kalkulado, eble ankaŭ kun eraro, mi trovis 69 kiel nombro de jarkolektoj.

Tre ŝajnas ankaŭ taŭtologio en la titola paĝo. Manko de retadreso en la kolofono certe ne faciligas kontaktojn kun la redakcio.

Andrzej Kołpanowicz

(La artikoleto estis publikigita en la 4 (50) n-ro de „Apudvistula Bulteno” de la Krakova Societo Esperanto).

* * *

Kara Adreo

Mi nur volas rilati al unu afero, menciita en via letero, nome al la aĝo de *Pola Esperantisto*. Estas fakto, ke la unua numero de PE aperis en la jaro 1906, kaj ĉiuj miaj matematikaj kapabloj, kiujn mi posedas, diras al mi, ke de tiu jaro pasis ĝuste 97 jaroj. Tiu ĉi nombro signifas do la **aĝon** de nia

revuo, kaj ne aperitajn **jarkolektojn**. Mi admiras tamen vian esloremon tiurilate, speciale pro la fakto, ke eĉ niaj historiistoj ne kuraĝis tion fari.

Amike

Kazimierz



Kara Kazimiro,

mi sendas al vi la artikoleon, kiun vi eventuale uzu laŭ via deziro. Mi ne volis ofendi persone la Aŭtoron de la lingva anguleto, tamen post trealego de liaj fantaziaĵoj rilataj akuzativon en la 3a n-ro, mi serioze dubas pri taŭgeco de ĉi tiu anguleto. Problemo estas en tio, ke la Aŭtoro miksas ĝustajn, valorajn sciigojn kun evidente eraraj, fantaziaj, kaŭzantaj en kapoj de legantoj malordon eĉ kaoson.

Malhela Anguleto

Kiel fervora ŝatanto de diversaj lingvaj anguletoj, kredanta je konsiloj de kompetentuloj, kun vera ĝojo mi ekstudis la publikaĵon en la 2a n-ro de „Pola Esperantisto” sub esperiga titolo „La artikolo **la**”. Tiu ĉi temo ŝajne simpla ĝis hodiaŭ kaŭzas varmajn disputojn eĉ inter specialistoj. Konata estas ankaŭ daŭra embaraso precipe inter poloj, ĝenerale slavo, certe eĉ baltoj, se temas pri ĝusta uzado de la jam menciita artikolo.

Ne konsolas min la fakto, ke preskaŭ ĉiuj francoj erare uzantaj la

akuzativon, aŭ hungaroj forte akcentantaj la unuan silabon, aŭ rusoj grumblantaj mallaŭte, ne tro emocias pri tiuj lingvofuŝaĵoj kaj mi opinias, ke nia kara Majstro kreante la artikolon **la**, venĝis kruele montrante al ĉiuj slavo kaj baltoj, ke en la plej facila el lingvoj estas ankaŭ baroj nevenkeblaj. Tiel mi konkludis traeliginte la tutan artikolon. Nur en unu punkto mi konsentas plene kun la Aŭtoro, nome: *ke multaj esperantistoj havas malfacilaĵojn kun korekta uzado de difina, senfleksia artikolo la*.

Estis Pasko, mi havis multe da tempo kaj povis ĝissate ĝui la alsenditan E-gazetaron. Kvankam mi legis la revuojn ĝis malfrua nokto, mi ne povis ekdormi. Mi komencis laŭ malnova maniero kalkuli ŝafojn. Kalkuli ŝafojn aŭ **la** ŝafojn? Ĉiuj miaj ŝafoj dividiĝis je kalkulitaj kaj kalkulotaj. Ĉu kalkulotaj ŝafoj (ĉiuj ŝafoj el la grandega, verda herbejo) estas reprezentantoj de sia klaso (kategorio) aŭ ne estas? Ĉiuj ŝafoj havas kvar piedojn kaj aliajn preskaŭ identajn ecojn, do certe ili meritas, por ke mi nomu ilin reprezentantoj de sia klaso kaj kategorio. Konklude: **la** ŝafoj. Nu, bone, sed kion fari kun la ŝafoj, kiujn mi jam kalkulis? Ĉu tio signifas, ke mi iamaniere ekkonis ilin kaj ili igis konkretaj? Ĉu ili eble transformiĝis en **la la** ŝafojn? Helpu min, karaj gesamideanoj! Mian sendormecon pliprofundigis ankaŭ la fak-

to, ke mi ne scipovis solvi dilemon, ĉu mi okupiĝis pri ŝafoj dum Pasko aŭ dum **la** Pasko (eble dumpaske). La Aŭtoro de la artiklo pri la artikolo **la** parolas jene: *la nomojn de preskaŭ de ĉiuj festoj ni skribas sen artikolo. Ekzemple Pasko, Pentekosto, Kristnasko (escepte): la Pasko, la Pentekosto*. Li mencias ankoraŭ vicon de diversaj festoj kun artikolo **la**. Sen komentario...

Ĉe okaze mi eksciis pri festo, kiu nomiĝas **la** Palmaĵoj. Ĉu temas pri Palmofesto alie Palmodimanĉo (PIV)? Post aserto, ke sen artikolo **la** oni skribas interalie nomojn de maroj, montoj kaj riveroj, la Aŭtoro unuspire citas; **la** *Ruĝa Maro*, **la** *Norda Maro*, **la** *Balta Maro*, **la** *Blua Rivero* (*kie ĝi troviĝas?*), **la** *monto Everest*, **la** *rivero Odero*, **la** *Monto Blanka*. Nur lago Jamno ne atingis honoron ricevi la artikolon **la** certe pro nobla modesteco de la Aŭtoro.. Mi eksciis ankaŭ, ke kontraŭe al titoloj de klasikaj verkoj, modernaj verkoj neniam alprenas la artikolon. Mi tuj rigardis mian bibliotekan breton: jen tri dikaj volumoj sub titolo „La Faraono”, post ili maldikaj „La nova Vivo” kaj „La Dormanta Grafino”. Mi ŝatus ankaŭ atentigi, ke: *La rivero Odero*. *La prezidento Wałęsa*. *La principino Diana* ne estas frazoj.

Ekzemploj de evidente erara ortografio ne devontus tute aperadi en la „lingva anguleto”. Neniam ni skribas: *Johano Paŭlo la dua*, *Kazi-*

miro la granda, sed kompreneble; Johano Paŭlo la Dua, Kazimiro la Granda.

Al scivolemuloj, kiuj dezirus ricevi pli valorajn informojn pri la priparolita temo, mi proponas tre utilan traktaton de Adomas Vaitilavičius sub titolo: „Difina artikolo kaj ĝia uzado” aperinta en 2-3 (2002) n-roj de „Litova Stelo”.

Ĝis **la!** Ĝis!

Andrzej Kołpanowicz

PS. Super la mallerta desegnaĵo troviĝanta sub la subskribo de la Aŭtoro, montriĝas tri enigmaj majuskloj KKK. Se ili ne signifas Ku Klux Klan-on sed ekzemple Koŝalinan Klubon de Krokodiloj, mi volonte membriĝos kaj eble kun aprobo de la klubestraro mi iniciatos ĝian sekcion ankaŭ en Krakovo kaj Krzeszowice.

* * *

Repliko al

Estimata Samideano Andrzej Kołpanowicz.

Vian artikoleon titolitan „Malhela Anguleto” mi tralegis kun streĉita atento, kvankam ĝi fakte indas nenian atenton pro multaj ĝeneralaj kaj kontraŭveraj, skribitaj sen pli profunda pripensoj.

Traleginte viajn rimarkojn mi komence ne intencis polemiki kontraŭ vi eĉ per unu vorto. Sensence ja estas publike diskuti kun certa kate-

gorio da personoj, kiuj evitas konkretajn, objektivajn kaj honestajn argumentojn, por esprimi sian malkontenton pro io ajn. Havante tamen la impreson, ke vi kutimas ĉion rigardi tra via persona, malhela vitro, ke eĉ al fiŝo vi pretus instrui naĝarton, mi decidis rilati al viaj impertinentaĵoj.

Vi skribis: „Aŭtoro miksas ĝustajn, valorajn sciigojn kun evidente eraraj, fantaziaj, kaŭzantaj en kapoj de legantoj malordon, eĉ kaoson”. Via frazo restis tamen sen konkretaj ekzemploj de miaj evidente eraraj kaj fantaziaj sciigoj, kiuj kaŭzis „malordon kaj kaoson” en via kapo.

Mi afable do informas vin, ke en preparado de miaj lingvaj materialoj, estis utiligataj de mi informoj troviĝantaj en **Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto** kaj en **Plena Analiza Gramatiko de Esperanto**. Skribante, ke miaj sciigoj estas evidente eraraj kaj fantaziaj vi antaŭ ĉio subfosas fidon al la aŭtoroj de tiuj ĉi valoraj eldonaĵoj.

Se vi havus Plenan Analizan Gramatikon de Esperanto, veran fonton de ĉiuj gramatikaj reguloj, vi tute certe ne skribus stultaĵojn, per kiuj vi nur ridigis min.

Mi absolute ne sentas inklinon al fantaziaĵoj, tamen vi, en via impertinenta artikoleto, vere fantaziaĉas, eble pro via malsukceso en nokta kalkulado de ŝafoj.

Mi deziras nun rilati al kelkaj

viaj rimarkoj koncernantaj la uzadon de **la**-artikolo:

• **Vi skribis:** „Mian sendormecon pliprofundigis ankaŭ la fakto, ke mi ne povis solvi dilemon, ĉu mi okupiĝis pri ŝafoj dum PASKO aŭ dum **la** PASKO (eble dum-paske)”. Se vi nokte deziras solvi la dilemon, kiu ja estis solvita de lingvistoj antaŭ multaj jardekoj, do vi vere estas admirinda homo.

• Ĉiujn nomojn de festoj, antaŭ kiuj oni ne uzas **la** artikolon oni povas trovi en Plena Analiza Gramatiko de Esperanto (paĝo 98, paragrafo 77, punkto 7). Inter la festoj troviĝas ankaŭ **PASKO**. Tiun ĉi informon sekvas tamen la rimarko, ke oni trovas esceptojn: **la Pasko**, **la Pentekosto**. Ĝuste tiuj ĉi esceptoj kun **la** artikolo apartenas al nia Majstro L. Zamenhof. Ĉu vi vere ne sciis pri tio?

• **Vi konfesis:** „Ĉe okaze mi eksciis pri festo, kiu nomiĝas **la Palmajoj**”. **Tiamaniere mi neniam nomis la feston!!!** Mi skribis tute klare por ĉiuj: Kiam la festo ne estas nomata per la nomo de okazintaĵo, oni uzas **la** artikolon: **ekz. la tago (festo, dimanĉo) de:** la Tri Reĝoj, **la Palmajoj, la Kristokorpo ktp.**

Post la elekto de ĝusta vorto el krampoj aperas plena nomo de la festo: **Dimanĉo de la Palmajoj** (klarigo troviĝas ankaŭ en PAG sur la sama paĝo).

Se ne plaĉas al vi la nomo de tiu ĉi festo, vi povas preni aliajn no-

mojn el PIV.

Memoru, ke Esperanto estas tre riĉa lingvo kun multaj sinonimoj.

• **Vi skribis:** „Post aserto, ke sen **la** artikolo oni skribas **i.a.** nomojn de maroj, montoj kaj riveroj la Aŭtoro unuspire citas: la Ruĝa Maro, la Norda Maro ktp.

Nur lago Jamno **ne atingis honoron ricevi la artikolon**, certe pro **nobla modesteco** de la Aŭtoro”. Se la aŭtoroj de PAG skribas sen artikolo la nomon **Ĝeneva Lago** (la lago situanta proksime al Ĝenevo), analogie oni povas skribi **Jamno Lago** (la lago situanta proksime al la vilaĝo Jamno). Via fantazia komentario rilate al manko de **la** artikolo antaŭ **Jamno Lago** estas vere ridinda. En PAG sur la paĝo 99, troviĝas ankoraŭ unu rimarko: „Kiam la propraj nomoj estas akompanataj de epiteto, oni uzas la artikolon antaŭ ĉi lasta”: ekz. **la** rivero Odero, **la** lago Jamno, **la** urbo Koszalin ktp.

Vi tamen ne konas ankaŭ tiun ĉi gramatikan regulon kaj skribas: „Nur **lago Jamno** ne atingis honoron”... (antaŭ **lago** vi ne skribis **la** artikolon, kial?).

Eble vi ne trastudis ĝis nun la utilan traktaton: „Difina artikolo kaj ĝia uzado”. Mi ne rekomendas tamen studi ĝin nokte, ĉar la rezultoj povas esti malbonaj.

• **Vi skribis:** Mi eksciis ankaŭ, ke kontraŭe al titoloj de klasikaj verkoj, modernaj verkoj neniam alpre-

nas **la** artikolon”. Tiun problemeton klarigas PAG sur la paĝo 99, punkto 7d. „La titoloj de la klasikaj verkoj regule alprenas **la** artikolon. Male tiuj de la modernaj preskaŭ **neniam**”.

• **Vi atentigis min ankaŭ**, ke: „**La rivero Odero. La princino Diana**” ne estas frazoj. Vi pravas, ili estas nur partoj de frazoj aŭ nur esprimoj. Pli gravas tamen logika frazkonstruado. **Vi skribis:** „ekzemploj de **evidente erara ortografio...**”, „...liaj fantaziaĵoj **rilataj akuzativon**” kaj oni devus skribi:

„ekzemploj de evidentaj ortografiaj eraroj”, „liaj fantaziaĵoj rilate la akuzativon”. Memoru, ke estas ankaŭ diferenco inter ortografiaj kaj gramatikaj eraroj.

• Mi tre ĝojas, ke vi neniam skribas „Johano Paŭlo **la dua**, Kazimiro **la granda**. Por mi gravas tamen la skribmaniero montrita en PAG. **Jen du ekzemploj:** Ludoviko **la dekkvara**, Frederiko **la granda**. Ĉu inter tiuj ĉi ekzemploj kaj miaj ekzemploj estas ia diferenco? **Absolute ne!** Vi rajtas tamen pro la granda estimo kaj amo al nia Sankta Patro skribi Johano Paŭlo **la Dua** kaj certe neniu atentigos vin pri farita eraro.

Finante mi volas certigi vin, ke nia Majstro, kreante la lingvon internacian, ne kreis **la** artikolon sed nur prunteprenis ĝin el aliaj lingvoj.

Via aludo al la „**enigmaj ma-** 123

juskloj KKK” atestas eble pri via „**bon-tono**”, do mi ne rilatas al ĝi des pli, ke mi ne estas aŭtoro de tiu ĉi bela desegnaĵo kun la enigmaj literoj.

Dezirante al vi eltenemon en la plua lingvoperfektigado mi kore salutas vin. Se la lingva materialo troviĝanta en Plena Analiza Gramatiko de Esperanto ne forigos kaoson el via kapo, skribu al la Akademio de Esperanto kaj prezentu vian malkontenton pro la presitaj fantaziaĵoj **en tiu ĉi 598-paĝa libro**.

Kun vera estimo

Czesław Baranowski



Estimata Sinjoro Redaktoro!

Volontigita per Viaj konsiloj (poentoj 10 kaj 12) mi volas esprimi mian opinion pri Via redakcia artikolo en la 3a n-ro de *PE*.

Post ĝia tralego, mi ne vekiĝis sed koleriĝis. Ĝis nun mi naive pensis, ke almenaŭ sur la E-kampo oni povus ripozi de la senĉesa, tedaĉa kaj aroganta porunia agitado — bedaŭrinde, tiu reĝima, kontraŭpola propagando ekregis ankaŭ redaktoron de *Pola Esperantisto*.

La grandaj reĝimaj amaskomunikiloj ricevas bruselajn direktojn kaj devas veneni la popolon per la vomokaŭzanta propagando, sed Vi libera, sendependa homo kia-cele tion faras?

Ĉu Vi ne vidas, ke la plej fervore agitas al EU iamaj altrangaj partiaj funkciuloj — iam obeemaj al Moskvo kaj hodiaŭ al Bruselo?

Ŝajnas al mi, ke Vi ne estis karesata per la komunisma aparato (eble mi eraras).

Se la Union laŭdas kaj lanĉas la malamikoj de Poloj kaj Pollando, tio plene konfirmas kiel pereigo por nia Patrujo estas tiu Unia ideaĉo.

Rezulto de la referendumo jam estas certa, ĉar: 1) la popolo estas stultumita, 2) ne gravas kiu balotas, sed kiu voĉojn kalkulas (Lenin).

Pro tio mi deziras al ĉiuj eŭroentuzismuloj escepte longan vivon, por ke ili sur propra haŭto eksentu „bonfarajojn” de unia paradizo.

La pola E-komunumo estas, same kiel la tuta socio, dividita laŭ diversaj kriterioj — ĉu prudentas ankoraŭ dividi ĝin per Unia disigo?

Kun E-salutoj

Marian Łaba

* * *

Kara Sinjoro

Dankon por via letero. Mi dankas pro esprimo de viaj opinioj, kio signifas, ke vi ne nur abonas, sed ankaŭ legas la revuon. Mi tre ĝojas pro tio, ĉar ĝuste vi estis unusola persono, kiu en pasinta jaro opiniis, ke relanĉo de *Pola Esperantisto* estas sensenca!

Neniam mi estis „Eŭroentuzismulo”, same kiel „Eŭroskeptikulo”. Mi

devas konfesi, ke ĉiam mi estis (kaj estas) „Eŭrorealisto“, kio signifas, ke ĝuste pro kvazaŭkomunisma sistemo, reganta en nia lando ĝis nun, mi vidas la ŝancon por poloj kaj Pollando vivi en pli civilizita mondo, kiu jes, devigas nin: forĵeti ĝisnunan pensmanieron kaj antaŭjuĝojn.

Amike,

Kazimierz Leja



Kara Sinjoro,

Mi konfirmas la ricevon de Via sendaĵo kun nova „Pola Esperantisto“ — 2 ekz. Dankon. Vere la revuo estas tre interesa kaj valora.

Precipe plaĉis al mi Via redakcia artikolo „Legu kaj vekiĝu!“ Mi samopinias, konsentas kun Vi, kun viaj opinioj. Malgraŭ tio, ke la Papo, Episkoparo, multaj seriozaj aŭtoritatoj parolas pri nia ŝanco en Unuiĝinta Eŭropo ĉiam aŭdeblas opinioj kontraŭaj, eĉ oni parolas stultaĵojn. Ja de multaj jaroj en Eŭropa Unio estas diversaj landoj kaj neniu el ili perdis identecon, sendependecon.

Eŭropa Unio ne ordonas al la landoj, kiuj apartenas al Unio, ke tie oni mortigu nenaskitajn infanojn ĉu maljunulojn (eŭtanazio). Pri tio decidus unuopaj landoj. En Nederlando oni ekzemple decidis pri

tiuj ĉi aferoj, sed aliaj landoj tion ne faras kaj neniu povas enmiksiĝi en internaj aferoj de unuopaj landoj. Unuopaj landoj eĉ povas multe enporti, kontribui al la komuna Eŭropo. Pri tio ankaŭ parolas la Papo kaj Episkoparo. Precipe ni, poloj kun nia kristana, katolika moraleco, kulturo ktp.

Laste multe oni parolis pri multlingveco en Eŭropa Unio. Oni diris, ke kiam novaj landoj eniros al Eŭropa Unio la situacio ankoraŭ „malboniĝos“, ĉar oni devas multajn novajn interpretistojn, tradukistojn laborigi, ke el Pollando certe devos labori ankaŭ 70 tradukistoj. Al ĉiuj oni devas pagi, do Eŭropa Unio elspozos multe da mono por pagi al interpretistoj. Oni diris, ke plej bone se ĉiuj lernu la anglan lingvon.

Mi demandas: kial ne Esperanton? Ja Esperanto ne nur estas internacia, sed ankaŭ neŭtrala kaj pli facile lernebla ol la angla. Bone, ke sur la placo de S-ta Petro dum la Papaj salutoj gesamideanoj venas kun granda panelo kun surskribo ESPERANTO. Bedaŭrinde Vi pravas, kial oni nenion mencias pri tio, neniu komentario. Kaj ni, poloj ankaŭ Esperanton povus enporti en Eŭropan Union. Ja tiu ĉi lingvo naskiĝis en nia lando. Ĉu niaj aŭtoritatoj hontas tion?

Kial?

Kun elkoraj salutoj!

Bogusław Sobol 125

Rosmaroj

El inter esperantistoj en Gdynia kelkaj personoj banas en la maro dum vintro, aŭtuno, printempo kaj somero. Tiuj personoj banas regule jam de kelkaj jaroj kaj instruas aliajn bani kaj naĝi. Ili nomiĝas „Rosmaroj” (Morsy).

Tiuj banoj servas al hardigo de la korpo kaj tre bone servas al la sano. Rosmaroj renkontiĝas kaj banas en ĉiu sabato kaj dimanĉo dum la horoj 12.00–14.00 sur la plaĝo apud Polanka Redłowska en Gdynia.

Ni invitas ĉiujn volontulojn al tiuj agrablaj banoj. Tiuj, kiuj ne povas bani, promenas tra la marbordo. Tio estas t.n. sunaj maraj banoj. En la aero troviĝas saniga jodo, sur alta bordo kreskas arbaro.

Andrzej Witt
Prezidanto de la Klubo de
„Rosmaroj”



Esperanto-renkontiĝo ĉe Slava Lago en Lubuŝa vojevodio

La renkontiĝo okazis dum la tagoj 12–15 de junio. Nia klubo „Verda Monto” en Zielona Góra organizadas la printempajn renkontiĝojn ĉe la lago ĉiujare ekde la 1996; unue en Lubiatów, poste en Radzyń kaj nun, jam la duan fojon en Sława, en la gastema ripozejo de Pola

Ruĝa Kruco. Ĉi tie ni organizas la renkonton kune kun junulara grupo el Saksio, kie s-ro Benoit Philippe, la instruisto pri la franca lingvo en Gimnazio B. Brecht en Dresdeno gvidas E-grupon kaj iniciatis nian kunlaboron, kiam li eksciis, ke ankaŭ mi en la Liceo en Nowa Sól gvidas Esperantan junularan grupon.

Ĉi-jare, simile kiel la pasintan jaron, la renkontiĝon partoprenis ĉirkaŭ 60 gejunuloj kaj 20 plenkreskuloj; vizitis nin multaj gastoj el la urbetoj de nia kaj najbaraj vojevodioj.

Ĉi-jara aranĝo havis tre riĉan programon, kiu estis tiom interesa, ke niaj gejunuloj eĉ rezignis pri planata diskoteko. Ni organizis lecionojn en tri grupoj, ekskurson al Zielona Góra, kie la gelnantoj devis trovi konstruaĵojn prezentitajn sur ricevitaj bildoj, kaj poste prezenti priskribon de tiu konstruaĵo esperantlingve kaj ankaŭ per desegnaĵoj.

Ni lernis kanzonojn, poemojn, promenis nokte observante la stelojn, pri kiuj interese rakontis s-ro Paŭlo Preś el Vroclavo; s-ino Ela Grzebień gvidis interese kaj amuze lecionojn, s-ino L. Nowicka kun sia knabina teatra grupo prezentis tri teatraĵetojn. La tria, pri „Ruza vulpeto” estis prezentita dum la sabata vespero ĉe ŝtipfajro, en bela, natura scenejo, ĉe la belega Slava Lago. Tie ni ankaŭ kantis kaj pre-

zantis poemojn de polaj kaj germanaj poetoj.

Kun ni ĉeestis multaj eminentaj gastoj: starosto de Nowa Sól, direktoro de Liceo, nia iama prezidanto A. Beyga kaj multaj niaj fidelaj geamikoj-esperantistoj. Sume dum tiuj tagoj vizitis nin pli ol 20 personoj. Dank' al tio ni havis okazon plifirmigi Esperantajn kontaktojn, interŝanĝi informojn pri pasintaj kaj alproksimiĝantaj eventoj. (Multe mirigis min, ke kelkaj eĉ ne scias pri reviviĝinta „Pola Esperantisto”). Ni decidis organizi pli oftajn informajn renkontojn en Zielona Góra aux Głogów, ankaŭ kun Wschowa, Rawice, Gostyń. Tiamaniere la mallonga renkonto en Sława donos pluajn fruktojn.

Niaj germanaj geamikoj antaŭ hejmeveno vizitis ankoraŭ la muzeon en Głogów kaj eksciis iom pli pri la malnova kaj nuntempa historio de tiu ĉi urbo, kie tiom interese sed ankaŭ tragike kunplektis sin la sortoj de slavoj, germanoj kaj judoj.

Plej multe ĝojigis nin — la organizantojn de tiu ĉi renkontiĝo — ke niaj gejunuloj kune kun plenkreskuloj tiom agrable travivis komune kelkajn tagojn. Ili amikiĝis kaj pli ekŝatis Esperanton, ĉar komprenis la signifon de komuna internacia lingvo.

Ili deziras reveni denove al Sława.

Bożena Pietrzyk
Nowa Sól, 18.06.2003

Forpasis eks-prezidento de la Filio de PEA en Gliwice

La 5-an de majo en la aĝo 74 jaroj mortis eks-prezidanto de la Gliwice-Filio de PEA inĝ **Janusz Chrzanowski**. En 80-aj jaroj li estis la filion de PEA. Poste dum multaj jaroj estis ano kaj estro de Revizia Komisiono. Pli ol 25 jaroj kol. Janusz estis fidela al Esperanta movado helpante en la laboro de Gliwice-filio, helpante en la e-aranĝoj organizitaj en nia urbo kaj regiono. Lia modesteco kaj kolegeco restos en nia memoro.

Filio de PEA en Gliwice



La tria esperantista renkontiĝo en Pelplin

Jam tri foje renkontiĝis esperantistoj en pitoreska urbeto Pelplin en ĉemara regiono Kociewie (Kocjewe). En tiu urbeto de kelkaj jaroj aktive funkcias esperanta grupo kiun gvidas sinjorino Jadwiga Wasiuk. La 10-an de majo pli ol 80 geesperantistoj el gdanska regiono renkontiĝis por komune amuziĝi en esperantista etoso. Solenan malfermon de la kunveno partoprenis ankaŭ urbestro, prezidanto de la urba konsilantaro kaj reprezentantoj de la Ĉefa Estraro de PEA. Ornamis la malfermon grupo de gejunuloj „Modraki” kiuj kantis en pola kaj esperanto kaj prezentis la dancojn el sia regiono. Post solenaj

salutvortoj estis prezentitaj diversaj interesaj prelegoj. Posttagmeze oni proponis ekskursojn al interesaj urbaj vidindaĵoj. Pelplin estas fama pro sia cistersa Katedralo kaj pro troviĝanta en la dioceza muzeo — Libro de Gutenbergo. Antaŭ vespermanĝo oni povis aŭskulti interesajn babiladojn, rakontojn kaj ankaŭ danci. Tiu amika etoso daŭris ĝis malfrua vespero. Tiuj kiuj devis frue forveturi ege bedaŭris. Prezidanto de PEA kaj sekretario kiuj venis unu tagon pli frue kaptis la okazon renkontiĝi kun lokaj esperantistoj alvenintaj el Gdańsk, Malbork kaj Starogard Gdański. Ili diskutis pri situacio en PEA kaj informis pri planoj. Oni devas substreki la zorgemon de lokaj esperantistoj kaj speciale de Jadwiga Wasik kaj ŝia edzo. Ni proponas memori, ke kvara renkontiĝo okazos jam en venonta majo.



Ĉefa Estraro de PEA kunsidis en Mielno

Sabate, la 21an de junio renkontiĝis en Mielno (kadre de la Jubilea 25a Ĉebalta Esperantista Printempo) estraranoj de PEA por sia laŭvica kunsido. Kunsidon partoprenis Zofia Śmistek (Łódź), Jan Książek (Piotrków Trybunalski), Antoni Beyga (Siedlec), Jerzy Walaszek (Sosnowiec), Aleksander Zdechlik (Zabrze), Danuta Żelińska kaj Stanisław Mandrak (ambaŭ el Gliwice) kaj ĉeforganizanto de ĈEP Czesław Bara-

nowski. Venis ankaŭ anoj de la Ĉefa Revizia Komisiono — Elżbieta Kem-błowska (Łódź) kaj Stanisław Gończaruk (Szczecin).

Dum la kunsido oni pridiskutis diversajn organizajn aferojn. Gravaj estis ekonomiaj problemoj. Dank' al kompreno de nia situacio fare de la filioj de PEA kaj de niaj amikoj el Pollando kaj eskterlando, ni povas diri, ke nia situacio stabiligās. Laŭ niaj informoj ni jam kovris ĉiujn ŝuldojn de niaj antaŭuloj. Tio signifas, ke ni jam proksimiĝas al normala financa situacio de nia asocio.

Oni alte pritaksis la laboron de Jan Książek kiel ĉefdelegito kaj peranto de UEA en Pollando, kaj agadon de kol. Kazimierz Leja kiel eldonisto de multaj materialoj por instruado kaj informado pri Esperanto. Krome estis preparolitaj Esperantaj aranĝoj kaj renkontiĝoj en la dua duono de 2003 j. Se temas pri instruado oni lasttempe eldonis „Esperanto laŭ zagreba metodo” (Jerzy Handzlik) kaj „Esperanto junul-kurso” (Kazimierz Leja). Ambaŭ eldonoj estas bonaj iloj por instrui Esperanton en polaj medioj.

Ĉefa Estraro de PEA diskutis ankaŭ krome pri la kurso por instuistioj, ĉar tiu problemo estas de kelkaj jaroj tre grava por nia estonteco. Fino de la agado de nuna Estraro kaj proksimiĝo de la kunsido de la delegitoj de PEA devigas niajn rondojn pliordigi problemojn de siaj vicoj kaj siaj grupoj.